

RONA ESPERO



Cirkulero 48 por la membroj
de "Bona Espero" r.a., prezidanto:
s-ino Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a
D-48356 Nordwalde
tel. kaj fakso: +49 2573 626

Nordwalde, 97-12-22

Kara amikoj kaj subtenantoj,

kun granda bedaŭro la nuna estraro de nia societo komunikas al vi, ke ni retiriĝos de nia laboro. Membrokunveno (supozeble en marto 1998a) elektos novan estraron, se kandidatoj anoncos sin ĝis tiam al ni, aŭ dissolvos la societeton. (La resto de la donacoj kompreneble ankoraŭ estos ĝirata al Brazilo.)

Kio kondukis nin al tia drasta paŝo? Nu, unue oni memoru, ke niaj antaŭuloj en 1993 estis en la sama situacio. Tiutempe ni pretis transpreni la laboron, kaj tiel plufunkciis la societo. Nun ankaŭ ni ne plu vidas eblon por kunlabori kun ges-roj Grattapaglia, pro la samaj kaŭzoj, kiujn spertis niaj antaŭuloj.

Mi rezignas tie ĉi tro detalajn esplikojn kaj nur skizas kelkajn gravajn eventojn dum nia oficperiodo laŭ la evoluo:

1993: Kampanjo de Italaj Esperantistoj kontraŭ ges-roj Grattapaglia. Riproĉoj: Misuzo (ŝtelo) de mono, mistrakto de la infanoj.

1994: Nia unua vizito en Bona Espero. Niaj kontroloj pravas, ke la supraj riproĉoj estas senbazaj.

1995: La ŝtato Goiás ne plu pagas subvenciojn. - Sessemajna laboro de Rudolf Fischer en Bona Espero. Ŝoko: Ursula Grattapaglia anoncas, ke ŝia edzo kaj ŝi jarfine foriros. Hektika serĉo de posteuloj, granda artikolo kun alvoko por posteuloj en la revuo "esperanto".

1996: Nia tria vizito. Bona Espero/Brazilo planas filion en Alto Paraíso, kvankam mankas mono. En oktobro ges-roj Grattapaglia forpelas Belgan instruistino, kiu venis por labori en Bona Espero minimume unu jaron kaj por poste eble resti. Ĝis nun mi ne konas la kaŭzon.

1997: Jarkomence dissolvo de klasoj 6 ĝis 8. Forsendo de ĉiuj pli aĝaj knabinoj. Ni kritike redemandas, kiel tio konformas al la planoj, ke la filio en Alto Paraíso servu ĝuste por la pli aĝaj infanoj. Kaj kiuj entute estas la pli longdaŭraj planoj ktp.

Pro tiuj insistaj demandoj ges-roj Grattapaglia ekde tiam rifuzas korespondi kun ni. S-ino Grattapaglia intertempe asertas, ke ŝi neniam deklaris sian retiriĝon. Oni komisias direktoron de Bona Espero/Brazilo, s-ro Enivaldo Alves Silva el Brasília, "teni la kontakton al ni".

La novaĵoj, kiujn ni pere de s-ro Alves Silva ricevas, estas zorge "filtritaj". Nur el aliaj fontoj ni aŭdas tion, pri kio ni plurfoje rekte vane demandis ges-rojn Grattapaglia: ke ekzemple Adarci Ferreira, ĝis tiam instruistino en Bona Espero, foriris kaj ekloĝis en Alto Paraíso; pri la sorto de tiu kaj jena infano, kun kiu ni konatiĝis; kie restis aliaj instruistoj, kiujn oni subite ne plu mencias ktp. ...

Nia estraro en la somero decidis protesti kaj postuli de ges-roj Grattapaglia reveni al normala kunlaboro, ekzemple al rekta korespondado (la reciproka amika etoso kompreneble estas jam definitive damaĝita). Post 10.000 US-d. en januaro (por elektraĵoj instalajoj, tamen nur parte tiam jam bezonataj) ni sendas plian monon nur post ricevo de bilanco, kiu venas en aŭgusto. Fine de aŭgusto nia membrokunveno konfirmas nian sintenon. Ni sendas pliajn 9.000 US-d. kaj anoncas plian monon nur kondiĉe, ke ni finfine ricevu rektan poŝton el Bona Espero kun ĉiuj respondoj al niaj demandoj. Responde fakte venas letero kaj Esperant-lingva cirkulero de Giuseppe Grattapaglia (ekzempleron ni jen aldonas) kun kelkaj fotoj (kiujn teĥnike ne eblas distribui); enhave temas pri propagando, kiu prave mencias multajn atingajojn, sed - kaj tio estas tute kontraŭ niaj kutimoj - prisilentas la problemojn kaj malsukcesojn, kompreneble ankaŭ pli longdaŭran planon, ĉar tiu okulfrape ne ekzistas.

Por mencii ekzemplojn el la aldonita cirkulero:

Rosamira kaj Andréia ricevis (helpe de U. Grattapaglia) dometon de sia patro (kiu laŭdire riĉa edziĝis) kaj loĝas nun en Alto Paraíso - sen iu perspektivo vivteni sin. La dometon, en kiu ili loĝas kun maljuna parenco, ili ne povas manĝi, laboron ili ne havas. Ni opinias, ke oni devas finance subteni adoleskojn, ĝis kiam ili povas mem vivteni sin per laboro.

Ursula kaj Alini estas filinoj de du najbaroj kaj ne (plu) subtenataj de Bona Espero.

Laŭdire la "pionira domo" estas malkonstruita/malkonstruata.

Plia instruistino, ne plu menciita, kun sia familio forlasis Bonan Esperon.

Krome la letero, aldonita al la cirkulero, estis plena de insultoj kontraŭ ni "ĉantaĝuloj": Do, vane ni atendis iujn repacigajn vortojn: tio estis por ni la definitiva fino de ia kunlaboreblo. Ni sendis meze de decembro pliajn 8.500 US-d. pro formala plenumo de niaj plej bazaj postuloj kaj decidis retiriĝi.

Certe tiu (el viaj okuloj abrupta) fino de nia laboro estos por vi apenaŭ komprenebla. Ni provis longe, ne publikigi niajn problemojn, esperante, ke ili solviĝos iel. La cirkuleron 47 fine de julio ni tial sendis nur al niaj laŭleĝaj membroj, kune kun la invito al la membrokunveno, kiu okazis la 30an de aŭgusto. Sed nun ni devos ankaŭ informi la Esperantistan publikon, sen mencii tro da detaloj por ne pli domaĝi al la Esperanto-movado.

Kompreneble ni - same kiel niaj antaŭuloj - volonte transdonos nian oficon al posteuloj por nova estraro, tiel ke nia societo, la ĉefa monfonto de Bona Espero, plufunkciu. Kandidatoj anoncu sin al ni. Por ne malkuraĝigi tiajn homojn, ni ankaŭ detenas nin de ĉiuj negativaj aŭguroj. Kiu tamen postulos pli da informoj, povos ricevi tiujn, ĉar ni ne havas kaŭzon kaŝi ion.

Mi dankas al vi pro via ĝisnuna subteno kaj deziras al vi bonan novan jaron

Redy Fischer